LEGENDOJ de SES KONTINENTOJ en KLUBO de MUZIKO kaj LITERATURO

En Vroclavo, en Klubo de Muziko kaj Literaturo (Klub Muzyki i Literatury), la 12an de aprilo 2023, okazis neordinara okazaĵo. Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej) preparis prezenton de dulingve eldonita libro „LEGENDY SZEŚCIU KONTYNENTÓW - LEGENDOJ DE SES KONTINENTOJ" kun elektitaj ilustraĵoj de kunaŭtorinoj, vroclavaj pliaĝulinoj.

Siajn ilustraĵojn prezentis: Danuta Durman-Ulatowska, Renata Gładysiewicz, Zdzisława Hampel, Joanna Kwiatkowska, Irena Solarek kaj Czesława Śliwińska.

Publikon tre kore salutis, Małgorzata Komarnicka – Prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, kreintino kaj gvidantino de la projekto „FELIĈAJ, KREIVAJ kaj AKTIVAJ", la aŭtorino de la prezentita libro, Ryszard Sławczyński – Direktoro de la Klubo de Muziko kaj Literaturo kaj Renata Gładysiewicz.

Ambaŭ sinjorinoj dankis al la Direktoro pro ebleco organizi la programon en tiu grava kaj bela loko kaj enmanigis la librojn: „SPACERKIEM PO WROCŁAWIU – PROMENE TRA VROCLAVO" kaj „LEGENDY SZEŚCIU KONTYNENTÓW – LEGENDOJ DE SES KONTINENTOJ".

En la unua parto de la renkontiĝo, Małgorzata Komarnicka priparolis projektojn dank' al kiuj ekestis la eldonaĵoj kaj ŝi prezentis ĉiujn personojn, kiuj partoprenis en la lasta projekto, kaj do vroclavajn ilustrintinojn, esperantistojn kaj provlegantojn. En tiu projekto, esperantistoj el diversaj landoj rakontis legendojn, al kiuj ilustrintinoj preparis ilustraĵojn de diversaj teknikoj.



La ceteran parton de la renkontiĝo gvidis Renata Gładysiewicz, kiu inter alie invitis ilustrintinojn prezenti la legendojn el elektita lando kaj priparoli siajn ilustraĵojn. Fine de tiu parto de la programo estis, preparita de Irena Solarek, filmo, kiu prezentis ĉiujn ilustraĵojn de la ilustrintinoj.

Preparitan programon finis la konkurso, kiun gvidis Czesława Śliwińska. Gajnintoj ricevis gvidlibrojn, „SPACERKIEM PO WROCŁAWIU – PROMENE TRA VROCLAVO".

Renata Gładysiewicz dankis al la publiko pro alveno kaj invitis ĝin rigardi bildojn, vitralojn, dekupaĝojn kaj interparoli kun la ilustrintinoj. La Ilustrintinoj volonte respondis demandojn, informis pri plastikaj teknikoj kaj materialoj de la ilustraĵoj.



La renkontiĝo okazis en tre amika etoso, kaj por ni, la kunaŭtorinoj kaj ilustrintinoj estis emocia sperto. Unuafoje ni prezentis kaj priparolis niajn ilustraĵojn en tiu grava por kulturo de Vroclavo loko.

Irena Solarek